NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2006 **Nro. 63 (1/06)**



Juna esperantistino atenteme aŭskultas la prelegojn dum la Z-festo

Z-FESTOTAGO.

Kiel anoncite, la sabaton 17an de decembro, oni kunigis, en la E-Grupo de Bilbao, aron de esperantistoj por festi la 146a datreveno de la naskiĝo de Dro. Zamenhof. La kunvenon partoprenis dudeko da esperantistoj, entuziasme akceptataj de la nuna estraro.

Mallonge prelegis nia senlaciĝa kaj veterana amiko **Eduardo Larrouy** pri la lastjaraj eventoj kaj antaŭenpuŝis nin disvastigi Esperanton, malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj ekzistantaj en la aktuala mondo.

Post la prelego, kiel tradicie, ni ĉiuj vigle interparolis ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj kaj havis la eblecon renkonti malnovajn konatulojn, fari la lastajn aĉetojn de la kristnaska loterio kaj transdoni bondezirojn okaze de la fino de la jaro. Ĝis la venonta ....

RIPAROJ DIVERSAJ ĈE NIA DOMO.

Tiel ke nia sidejo troviĝas ene de la malnova kvartalo de Bilbao, en domo kiu aĝas pli ol 150 jaroj, renovigaj laboroj estas preskaŭ ĉiujaraj.

En januaro, urbaj policistoj telefonis matene al nia Prezidanto por sciigi ke elfluo de akvo ĉe la necesejo malpermesis al najbaroj pace dormi dum la tuta nokto. Kaŭzo de tio estis tubo difektita. Feliĉe, alvoko al plumbisto solvis la problemon, sed aperis alia: ĝenerala tubo de la domo, kiu ankaŭ devas esti riparita.

Alie, okazis kunveno de la najbaroj por pritrakti la eblecon munti lifton, tiel ke, iom post iom, estas pli da gemaljunuloj en la konstruaĵo. La problemo estas ke tiu propono signifus granda kvanto de mono. Oni antaŭkalkulis ke ni devus pagi ĉirkaŭ 12.000 eŭroj. Ĝis nun estas nur propono, sed jam komencis la demarŝoj por havi ĉiujn permesojn de la aŭtoritatuloj.

NOVA KURSO ĈE LA VASKA UNIVERSITATO.

La pasintan 13an de marto komencis nova kurso de Esperanto en la Vaska Universitato, nome ĉe la Instruista Altlernejo. Kiel kutime, ĝi estas gvidata de **Jesús M. García**. Jam la 6an jaron. Ĉi foje aliĝis 16 gelernantoj, kiuj, post la koncerna ekzameno, ricevos sukcesatestilon pri studobjekto kun valoro de 4,5 kreditoj, t.e., 45 horoj.

PAGO DE JARKOTIZOJ 2006.

Jam eblas ĝin fari. Baldaŭ ni sendos la kvitancojn al tiuj, kies kontonumeron ni scias. La aliaj havas la kontonumeron de la Grupo sur la unua paĝo de tiu-ĉi cirkulero.

HISPANA KONGRESO.

La 65a Hispana kongreso de Esperanto okazos en El Puig (Valencio), belega kaj historia vilaĝo apudmara, de la 21a ĝis la 25a de julio.

(Informis Augusto Casquero)

ESPERANTO EN ANDALUZAJ UNIVERSITATOJ.

Laŭ informis ĵurnalo "Jaén", la 29an de novembro, en la Popola Municipa Universitato de Jaén okazas kurso de Esperanto, gvidata de Jordi Liétor López, kiu ankaŭ instruas tie la germanan. La ĵurnalo tre favore priskribas nian lingvon. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo lanĉis la programon "Esperanto en la Universitato", kiu celas starigi kursojn de Esperanto en pluraj andaluzaj universitatoj. Kunordigas la projekton nia kara amiko José María Rodríguez Hernández, el Córdoba. Jam oni komencis demarŝojn por okazigi kursojn en la Universitatoj de Málaga , Huelva kaj Sevilla.

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Decembro 2005)

E-KURSOJ EN UNIVERSITATOJ KAJ ALTINSTITUTOJ.

Ĝis nun oni ricevis konfirmon pri 41 E-kursoj oficiale organizitaj en universitatoj kaj samgradaj altinstitutoj el 21 landoj.

- Austrio : Innsbruck
- Brazilo : Brasilia - Campinas - Curitiba - Sao Paulo
- Ĉekio : Brno
- Ĉinio : Dalian - Hefei - Hubei - Shangdong - Tianjin
- Germanio : Bamberg - Berlin - Emden - Münster - Paderborn
- Hispanio : Bilbao
- Hungario : Budapest
- Italio : Torino
- Japanio : Minoo
- Korea Resp. : Iksan - Seoul/Chonan - Seoul/Yongin
- Kostariko : San Jose 2x
- Kubo : La Habana
- Litovio : Kaunas - Siauliai
- Meksiko : Mexico
- Nederlando : Amsterdam
- Pollando : Poznan 2x
- Rusio : Tagil - Vladivostok
- Svedio : Stockholm - Umea
- Usono : Brattleboro - Elsah - Rochester - Satnford/Palo Alto
- Uzbekio : Tashkent
- Venezuelo : Caracas

Informis: Germain Pirlot (07/01/2006)

ZAMENHOFA FESTOTAGO


BILBAO, LA 17-an de DECEMBRO 2005.



Eduardo Larrouy alparolas la ĉeestantojn dum la kunveno



Ĝenerala aspekto de la kunvenejo



Nia amiko Teodoro Ibáñez vigle alparolas alian ĉeestanton

SPORTA TERMINARO

Pola Radio anoncis ke en la retpaĝaro de Eventoj eblas elŝuti vortaron pri sportoj "La sporta lingvo en Esperanto", de Tibor Ujlaky-Nagy. Temas pri iom malnova terminaro aperinta libroforme en Munkeno, Germanio, en 1972, kaj, kvankam ĝi bezonus aktualigon, la teamo de Eventoj pensis ke estas interesa disponigi ĝin rete al la tuta esperantistaro.

La terminaro amplekse rilatas al 30 diversaj sportoj plus mencioj al 32 aliaj. Ĝi ampleksas 174 paĝojn kaj estas elŝutebla laŭ formato "rtf" en jena retadreso:
http://www.eventoj.hu/steb/

Informis: Darío Rodríguez (24/01/2006)

"BLOGO" DE LA VALENCIA E-GRUPO.

Jen la blogo (Bitakoro) de Grupo Esperanto de Valencia. Ni klopodos meti en ĝi sufiĉe da informoj kaj artikoloj. Momente estas nur la komenco.
http://valenciaesperanto.blogspot.com/

Informis: Augusto Casquero (10/02/2006)

HISTORIA TRANSPASO.

La 27-a de februaro 2006 estos neforgesebla tago por la monda E-movado, ĉar okazis malofte aŭdita afero por la Esperanto-instruado. Post la diligenta laboro kaj penado tiutage Liaonging-provinca Esperanto-Asocio (LEA), Ĉinio, kaj Liaoning-provinca Instrua Instituto de Fremdlandaj Lingvoj por Altlernejoj kunlabore funkciigis la kurson de Esperanto-Historio en Historia kaj Kultura Instituto de Liaoning Universitato.

52 ge-instruistoj (profesoroj kaj docentoj) el la fremdlandaj lingvaj institutoj (fakultatoj) de pli ol 20 altlernejoj en la provinco anoncis sin por la kurso. La lerno-libro adoptita en la kurso estis "Evolua Historio de Esperanto", kompilita de s-ro Liu Zhengkun, prezidanto de LEA kaj profesoro de la universitato, kaj s-ro Song Yunsheng, honora prezidanto de LEA, kaj ĵus oficiale eldonita.

La instruistoj lernos Esperanton en la alia kurso krom tio ke ili sisteme lernos la evoluan historion pri Esperanto. Kion faris LEA celas baki amason da altkvalitaj Esperanto-instruistoj por altlernejoj. Tiutage 85 studentoj ankoraŭ elektis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kaj eklernis en du kursoj, unu en malnova sidejo de Liaoning Universtitato, kaj la alia en la nova sidejo. Se oni diras, ke novan paĝon de la Esperanto-instruado kaj Esperanto-movado malfermas sukecsa okazo de la kurso de Evolua Historio de Esperanto en Liaoning Universitato estas historia transpaso, do, granda inspiro al disvastigo de Esperanto en la mondo estas ĝojiga rezulto el la batalo de LEA - la estroj de la altlernejoj unuvoĉe decidis, ke Esperanto-kursoj estis funkciigota post kiam la instruistoj finstudis kaj revenis. Surbaze de bona komenco, LEA kaj Liaoning Universitato estas aktive kreanta medion por internacia kunlaboro en Esperanto-instruado.

(Informis: Germain Pirlot. 19/03/2006)

TELEVIDO EN ESPERANTO.

En la revuo "*Esperanto*", oficiala organo de UEA (Universala E-Asocio), de februaro 2006, aperas dupaĝa intervjuo al Flavio Rebelo, responsulo pri la fama interreta portalo "*Ĝangalo*" kaj pri la interreta "*Internacia Televido*". Jene ni resumas parton de liaj respondoj, ĉar la afero estas sendube ege interesa, kiel certa mejloŝtono en la historio de Esperanto.

Kiu povas spekti Internacian Televidon kaj kiamaniere?

Por spekti ITV oni direktu sian krozilon al la retejo de la televidkanalo: www.internacia.tv (aŭ http://internacia.tv). Oni povas spekti la programojn de ITV ankaŭ pere de kelkaj videoprogramoj, ekz. Windows Media Player, sed tiu solvo ne estas tiel bona, ĉar kiam oni ekzemple ŝanĝas programon aŭ faras iun gravan modifon, tiuj kiuj ne vizitas la retejon, scios pri la ŝanĝoj nur post kelkaj tagoj. Tio jam okazis en decembro, kiam ni ŝanĝis la rektan adreson de la elsendoj. Estas nur tiuj du manieroj.

El kio nuntempe konsistas la programo kaj kiaj estas la planoj por la estonteco?.

Nuntempe la programaro de ITV konsistas ĉefe el dokumentaj filmoj. ITV ankoraŭ ne kapablas produkti ekz. Varieteojn kun partopreno de la publiko. Tio estas afero kiun ni planas fari ekzemple dum la ĉi-jara UK. En 2006 ni komencas fari proprajn programojn, ekz. La porinfanan "*infanurbo*".

Kaj la kvalito? Ĉu ĝi atingos tiun de la surtera aŭ la satelita televido?

En Interreto ne. Ne pro ĝia manko aŭ nevolo. Simple protio, ke Interreto ne kapablas elsendi kun la sama bild- kaj son-kvalito kiel televido. Estas limigo de la teknologio mem. Ni devas ankoraŭ atendi 10-30 jarojn ĝis la interreta televido havos la saman kvaliton kiel la ordinara televido. Sed ni jam pretigas niajn programojn en duobla maniero: por elsendado en Interreto kaj ankaŭ por estonta elsendado per satelito aŭ kabla televido. Nia celo estas ĝis maksimume 2010 esti spektebla en almenaŭ kelkaj landoj de Sudameriko, Nordameriko, Eŭropo kaj eble Azio pere de satelito.

Ĉu la projekto jam vivas per siaj propraj monrimedoj, aŭ ĝi daŭre bezonas la subtenon flanke de esperantistoj?

Ni sukcesis en decembro akiri la unuan reklamanton. Verŝajne esperantistoj kiuj havas entreprenojn, vendas librojn, aŭ la libroservoj kaj revuoj, la kantistoj, la diskeldonejoj – ankoraŭ ne rimarkis kiel potenca povas esti la Internacia Televido por reklami siajn varojn, servojn kaj personojn. Pri renkontiĝoj kiuj okazos en 2006 kaj pri kiuj oni apenaŭ scias, se oni metos la reklamon en ITV, post unu monato, preskaŭ ĉiuj esperantistoj scios. Do, ne temas nur pri tio, ĉu la esperantistoj daŭre subtenas la kanalon aŭ ne, temas ja pri tio, ĉu la entreprenistoj esperantistaj finfine vidos en ITV valoran amaskomunikilon. Valora ne en la senco de elspezado, sed en la senco de oportuno; oportuna maniero komuniki rekte kun la klientoj, kun la aĉetantoj de diskoj, ktp.

URUEÑA ALVAREZ, Mª Rafaela (Bilbao, 1942)



Mª Rafaela Urueña naskiĝis en Bilbao kaj studis en Valladolid. Ŝi estas Doktorino kaj katedra Profesorino pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Valladolid. Ankaŭ aŭtorino de diversaj libroj kaj artikoloj, ĉefe pri Juro de la maro kaj protektado de la medio; apartenas al diversaj fakaj asocioj, naciaj kaj internaciaj; same, ŝi estas membro de la Katedro "Jean Monnet" de Komunuma Juro.

Esperantistino ekde 1960, interesiĝis pri la Internacia Lingvo post aŭskultado de programo pri Esperanto en radio; estis Prezidantino de HEF (Hispana Esperanto-Federacio) de 1978 ĝis 1984; nuntempe apartenas al la E-Grupo de Valladolid, kie dejoris en diversaj postenoj. Tuj post ŝia esperantiĝo gvidis kursojn en sia loka Esperanta Societo, prelegis pri aŭ en Esperanto kaj tre aktivis en la Movado. Dum tri sinsekvaj jaroj kunlaboris en *Programo pri Esperanto* en Radio Valladolid, kaj en 1981 ŝi redaktis la Juran Suplementon de "*Heroldo de Esperanto*".

Interalie, estas aŭtorino de la libro en Esperanto "ABC de la Eŭropa Unio", eldonita de la Universitato de Santiago de Compostela; prelegis dum pluraj UK (Universalaj Kongresoj) ene de IKU (Internacia Kongresa Universitato) pri fakaj temoj; apartenas al la Esperanta Jura Asocio, institucio kiu ankaŭ prezidis; kaj estas dumviva membro kaj Prof. De la Internacia Akademio pri Sciencoj de San Marino.

Nuntempe apartenas al la estraro de la loka Grupo "*Fido kaj Espero*" de Valladolid kaj neniam perdis la kontaktojn kun la esperantistoj de Bilbao, ŝia naskiĝurbo, kaj loko kiun vizitas ofte, tre speciale kiam ni alvokas ŝin por prelegi okaze de E-aranĝoj. Ni memoru la 75an datrevenon de la fondiĝo de la E-Grupo de Bilbao (1981), la Hispanan Kongreson de la jaro 1989 aŭ, lastan fojon, la 6an Eŭrop-Unian E-Kongreson de la jaro 2004.

(*El "Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo" de A. Marco Botella. Zaragoza 1987 kaj intervjuo en "La Nueva España", Gijón 13-10-1990*).

2006 !!!

LA E-GRUPO DE BILBAO 100-JARIĜAS